

Heinrich Heine, En admirinde bela maj'	Heinrich Heine, En Majo	Heinrich Heine, En la mirida bela Maj'	Heinrich Heine, En dolĉega Maj'
<i>tradukita de Hans-Georg Kaiser</i>	<i>tradukita de Manfred Ratislavo</i>	<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	<i>tradukita de Friedrich Pillath</i>
En admirinde bela maj', dum jam burĝonoj krevis, jen ankaŭ miakore la amo sin eklevis.	En Majo, kiam ĉiuj Burĝonoj malfermiĝis, La amo kiel floro En mia kor' estiĝis.	En la mirinda bela Maj', dum sin burĝonoj fendis, en mia kor' la amon mi disvolviĝi sentis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum la burĝonoj krevis, El mia koro ĝerme Amsento sin eklevis.
En admirinde bela maj', dum birdotril' senbridis, jen mi al ŝi sopirojn, dezirojn, ekkonfidis.	En Majo, kiam ĉiuj Birdetoj sin aŭdigis, Al ŝi deziron mian Sopiran mi sciigis.	En la mirinda bela Maj', dum birda tril' ne ĉesis, al ŝi sopiron mian konfide mi konfesis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum birda kanto sonis, De l' kora mi sopiro Konfeson al ŝi donis.
<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).</i>
<i>Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)</i>	<i>MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)</i>	<i>Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)</i>	<i>Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)</i>
<i>La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.</i>	<i>La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.</i>		<i>Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.</i>